



PENSEO

N-ro 306

apr. / 2017

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 28-a jaro <http://www.elperno.cn/penseo/penlisto.htm>

Anteo (Ĉinujo)



modo

kamelo vadas en dezerto,
kun kamelio sur la verto.
kial do? korvo sin demandas.
la certon scias nur lacerto.

2013.11.30

analoge

horloĝo frakasiĝis en pecetojn;
la tempo daŭras flui kiel lumo.
la korpo mortis antaŭ tridek jaroj,
mi tamen vivas perverse sub plumo.

2013.10.31

danko el ventra

pro soifo aŭ vol-braĝo
en la ventro io pulsas.
suno, pluvo kaj miraĝo
tubon spraji jam kompulsas.

2013.10.31

kien?

levitacie, danke febron,
fuĝis mi sola el tumulto.
monton kun grotoj feoj regas –
ve, da predikoj troa multo.

2013.10.30

Guozhu (Ĉinujo)



Gratulon al CF

Similas Songâ Silueto
al ŝveba ombro iluzia.
Flutludo sub luno vizia.
Sub pino liuta terceto.

Pado invitas en kvieto
al templo en etoso pia.
Similas Songâ Silueto
al ŝveba ombro iluzia.

Nun esperantigo en preto
aperas dank' al plum' genia
de Wang Chongfang erudicia
per fajna arto de poeto.

Ho, bela Songâ Silueto!



(2017-03-04)

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Eva

Edena ĝardeno:
scenejo de l' falo
de Adamo kaj Eva,
ambaŭ delogataj

per la ruzeco de Malbono,
kiu ĉiujn povigas.

Nu, vi diros,
vanfilozofie,
(kvazaŭ Sartre):
la serpento
estas aliaj,
kiuj kulturas
la florojn de l' Malbono,
kaj la mondon premas
ekde ĉiam.

Dume, mi priatentas
la serpenton,
kiu tamen dormetas
en iu malluma
angulo ene de mi.



Juiz de Fora, 04/03/2017.

Improvizize

La tago malfermiĝas
petaloj de suno kaj perplekso
pri l' mistero de l' ekzisto.

Kaj dancas sur birda grundo
ŝtalfloroj, kiujn mi kultivas
sur la eĝoj de l' poezio.

Juiz de fora, 11/03/2017.

Superregado

“Adjektivoj pasas,
kaj restas substantivoj.”
— diris Machado de Assis.

Kaj la verboj
(precipe en imperativo)
sin trudas al nia vivo.

Mi ne estas maŝino!
Ne plu eltenas mi
tiom da ordono!

La 21-an de Marto 2017 (La Monda Poezitagato).

Dimitrije Diso Janičić (Serbujo)



ENAMIĜINTO

Mi estas enamiĝinta.

Mi estas perdita
tutsola,
sub tegmento de ĉielo
kie ankaŭ vi estas.
Mi serĉas vin,
sed vin mi ne trovas
kvankam mi vidas vin
en lazuro de ĉielo,
en verdeco de herbo,
en odoro de floraro,
en ploro de novnaskitaj,
en akvokirloj de rivero,
en flugo de papilioj...

Mia koro ploras
ĉar ĉien vidis vin
sed vin ne havas.

Birdoj de viaj okuloj
kiel por provoko
surflugas bordojn
de mia sopiro.

Mi ne kuraĝas
fermi okulojn
via bildo
semante dubon,
frakasas mallumon
de mia soleco.

Mi estas enamiĝinta.

Ivanichka Madgharova (Bulgario)



Lumturo. Stelet'
ekbrilas sur la maro.
Fiŝistoj en bark'.

En la kameno
paliĝas la ardaĵo.
Paŝoj de cervin'.

Blankaj siringoj—
aromo en ĝardeno.
L' abeloj zumas.

L' aŭtun' pluvetas.
La birdoj grupbirdaras.
Konfitaĵ' el figoj.

el *Araneaĵoj*

Minosun (Ĉinujo)



Pluvadas fride;
Ombreloj oranĝruĝaj
Laŭstrate flosas.

La luno dormas.
Pro frapo pordo sonas—
Ekbojas hundo.

Gajo (Ĉinujo)



Printempo alvenas

1
Ho, mi jam vidas
printempon en verdiĝo
de salikbranĉoj!

2

Ho, mi jam aŭdas
printempon en kantado
de ĉiaj birdoj!

3

Ho, mi jam flaras
printempon en aromo
de fruaj floroj!

4

Do tiel fluas
la versoj de printempo
el mia koro!



2017-3-6. Yuanjiang

IMPRESO PRI ŜANHAJO

1

Homoj kaj homoj
svarmas kiel abeloj!
Kia Ŝanhajo!

2

Aŭtoj post aŭtoj
sur vojretoj navetas!
Kia Ŝanhajo!

3

Domoj, domegoj
staras kvazaŭ arbaroj!
kia Ŝanhajo!

4

Oni fieras:
“Ala^① ja ĉi-lokanoj!”
tamen mi fajfas^②!

2017-03-05

notoj:

① *Ala*, dialekta vorto de Ŝanhaj-urbo, kies signifo=*mi aŭ ni*.

② *Ŝanhajo*, kvankam estas la unua granda urbejo en Ĉinio, tamen ne konvena urbo por loĝi, tio estas kial mi fajfas kontraŭ ili.

Henriko Heine (1797-1856)



Bonŝanc' estas flirtema damo

Bonŝanc' estas flirtema damo
restadas nur dum unu hor',
karesas vin sur l' frunt' kun amo
tuj kisas vin — kaj iras for.

In' Malfeliĉo tute male
tre premas vin al sia kor',
ŝi ne rapidas, joviale
ĉe l' lito trikas kun fervor'.

El: Tiel tenere, kor' ĉe kor' . La plej belaj ampoemoj

Junulo amas inon

Junulo amas inon,
sed volas alian ŝi mem.
Sed tiu amas alian
kaj iĝas edzo pro em'.

La dam' pro ĉagren' edziniĝas
al iu ajn plia vir'
kuranta unue ŝin vojen.
Suferas li pro l' dezir'.

Jen vere malnova rakonto,
sed nova ĝis ĉi hor'.
Se ĝi okazas al iu,
disrompas ties kor'.



Esperantigis



Cezar (Germanujo)

laŭ: „Ein Jüngling liebt ein Mädchen“

Abengo (Ĉina Tajvano)



Anekdoto pri Zheng Ŝje *

Dum sia juneco la fama poeto Zheng Ŝje
vivis malriĉan vivon, ĉar tiam li ankoraŭ ne
fariĝis fama nek influhava. Pro tio li ne facile
forvendis siajn belajn kaligrafiaĵojn kaj
penetraĵojn, kvankam ili estis bonkvalitaj. En
lia domo preskaŭ nenio valora sin trovis.

Iutage, dum Zheng Ŝje kuŝis surlite, li
vidis ombron de homo ŝtele aliri ĉe la
fenestron. Li pensis ke tio certe estas ŝtelisto.
"Kion vi povas preni ion valoran el mia
hejmo?" Li nereteneble laŭte recitis versojn:

Sub la malklara luno vento blovas,
sinjor' al mia domo venas ŝtele.
Mi riĉas je klasikaj scioj mense,
sed ĉe mi ne troviĝas mono vere.

Tion aŭdinte, la ŝtelisto volis tuj foriri. La
poeto Zheng Ŝje recitis pliajn aliajn du versojn
al la vizitanto:

Ne la brunan hundon ŝoku porde,
ne disrompu poton jen enkorde.

La ŝtelisto haste grimpis la muron kaj
malzorgeme faligis kelkajn rompitaĵojn
brikpecetojn sur la teron. Ĉe tio la bruna
hundo ĉasis lin por mordi lin. Ĵetinte veston
sur la ŝultrojn, la poeto iris en la korton. Li
krie haltigis la hundon, helpis lin por stariĝi
kaj akompanis lin ĝis la vojo. Kun kunmetitaj
manoj la poeto ĝentile riverencis lin, recitante
adiaŭajn versojn:

En profunda nokto adiaŭas vin mi,
kun esper', ke bone konduku vi.



* Zheng Ŝje (Zheng Banĉjaŭ 1693-1765): oficialulo,
erudito kaj kaligrafo de Qing-dinastio de Ĉinio, fama

pro siaj pentraĵoj kaj kaligrafiaĵoj.

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKA

Malfermo de kesteto

§10-02

Ĉu vi vere ne scias pri la epoko, en kiu regis la perfekta virto? En la tempoj, en kiuj regis sinsekve la suverenoj Rongcheng, Dating, Bohuang, Zhongyang, Lilu, Lichu, Xuanyuan, Hexu, Zhunlu, Zhurong, Fuxi kaj Shennong, la homoj faris nodojn en ŝnurojn por registri aferojn, trovis bongustaj siajn nutraĵojn kaj belaj siajn vestojn, agrablaj siajn morojn, kaj komfortaj siajn loĝejojn. La popoloj en la najbaraj landoj estis vidataj unu de la alia, kaj la krioj de iliaj kokoj kaj la bojoj de iliaj hundoj estis aŭdataj de ili reciproke, sed ili neniam renkontiĝis unu kun la alia — oni simple vivis kaj nature mortis sen interrilatoj kun la ekstera mondo. En tiu epoko regis perfekta ordo.

Nuntempe tamen la popolo estas reduktita al tia stato, ke oni streĉas sian kolon kaj staras sur la pintoj de la piedoj, dirante: “Ie vivas iu saĝulo.” Oni do pakas siaj provizojn por la vojo kaj ekrapidis al li, forlasante siajn gepatrojn en sia hejmo kaj neglektante sian servadon al sia mastro ekstere. Oni piediras aŭ veturas per ĉaro, de loko al loko, de regno al regno, tiel ke la piedsignoj sin sekvas ĉie inter la landlimoj kaj la radsulkoj etendiĝas je mil lioj malproksimen. Ĉio ĉi tio estas la kulpo de

la regantoj, kiuj malmodere amas la saĝecon.

Kiam la regantoj malmodere amas la saĝecon kaj neglektas la Taŭon, la mondo estas ĵetita en grandan konfuzon. Kiel do ni scias, ke tiel estas? Ju pli la homoj scias pri pafarkoj, sagoj, retoj kaj kaptiloj, des pli la birdoj en la ĉielo estas ĵetitaj en konfuzon. Ju pli la homoj scias pri hokoj, logaĵoj, fiŝretoj kaj nasoj, des pli la fiŝoj en la akvo estas ĵetitaj en konfuzon. Ju pli la homoj scias pri pikstangoj, enfalujojn, kaĝoj, des pli la kvarpieduloj en la marĉejoj estas ĵetitaj en konfuzon. Ju pli la homoj scias pri artifiko, malbonoj, la sofismo pri “malmoleco” kaj “blankeco”, kaj la ĉikanaĵo pri “identeco” kaj “diferenco”, des pli la homoj estas ĵetitaj en konfuzon. Tial, kiam ajn la mondo estas en granda konfuzo, la kulpo kuŝas ĝuste en la malmodera amo al la inĝenieco. Sammaniere, la mondo estas ĵetita en grandan konfuzon tiam, kiam ĉiu penas ekscii, kion li ne scias, kaj ne volas profundigi, kion li jam scias; kaj ankaŭ tiam, kiam ĉiu volas kondamni, kion li ne aprobas, kaj ne kondamnas, kion li aprobas.

Rezulte de tio, la brilo de la suno kaj la luno supre malheliĝas, la energio de la montoj kaj la riveroj malsupre konsumiĝas, la alternado de la kvar sezonoj intere interrompiĝas, kaj eĉ neniu el la tre malgrandaj vermoj kaj noktopapilioj ne perdas sian denaskan naturon. Kiel granda estas la malordo, kiun la malmodera amo al la inĝenieco alportas al la mondo! Kaj ĉiam estas tiele ekde la tri dinastioj Xia, Shang kaj Zhou. La simplaj kaj senartifikaj homoj estas neglektataj, dum la ruzaj kaj glatalangaj homoj estas favorataj. La trankvileco kaj la senagado cedis la lokon al la senfinaj instruoj, kiuj jam ĵetis la mondon en grandan konfuzon.

Elĉinigis



Wang Chongfang

(Ĉinujo)

Ĉineske

Vejdo (Ĉinujo)



Omaĝe al Kampo de Literaturo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Printempe
degelas glaci',
ekverdas jen la kampoj,
ekplugas la teron ni
jen kun energi'.

Ni semas
ne tritikon, sed
semojn de literatur'
sur pura kaj varma bed'
sub zorgema bred'.

Kun helpo
de viviga vent'
kaj karesa pluvo ni
kultivas per diligent'
kaj riĉa talent'.

Somere
vetera favor'
kreskigas plantidojn, ni
flegas ilin sen langvor',
per saĝa labor'.

Surkampe
ni penu kune
akvumi, sarki, sterki,
kamplabori subsune,
ja ŝvit-konsume.

Aŭtune

ondoĵ de oro
ruliĝas en la kampo.
Jen fruktoj de valoro—
nia laboro!

Post penoj
ni rikoltas jam
multajn poemojn, prozojn
de homoj kun aŭ sen fam'
kreitajn kun am'.

La KL—
la bed' de kultiv'—
pliigas trezorejon
de nia kultura viv'
per nia kreiv'.



P.S. La retejo de Ĉina Radio Internacia pretas malfermi rubrikon Kampo de Literaturo kaj mi verkis ĉi tiun ĉineskaĵon omaĝe al ĝi.

Plantado de oro

el rakontoj pri Afanti

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*

Afanti
sur sia azen'
rajdis al la kamparo
kun pruntita oro jen,
poste ĉe sabla teren'
kribadis sen ĝen'

la oron.
Ĝuste por ĉaso
la reĝo renkontis lin
tie je preterpaso
ĉe sablamaso.

“Afanti,
kion faras vi?”
ĉuis li miroplene,
“Ne tenu min ja sen sci’,
respondu al mi.”

Respondis
Afanti ruze,
“Mi plantas oron, Moŝto.”
Tio kirlis amuze
lin kaj konfuze.

La reĝo
jen demandis plu,
“Kial vi plantas oron?”
“Ĉu vi ne komprenas, fu?
Nur inter ni du!

Mi semas
ĝin en teron nun,
post zorgema kultivad’
mi rikoltos en tempum’
ĝin je granda sum’.

Ekbrilis
la okuloj de
la reĝ’ kaj li konsilis,
“Vi estas malriĉa tre
kaj or-manka, ve!

Se semus
vi pli da or’,
vi rikoltus pli multe.
Eĉ per penega labor’
vi povus, sinjor’,

ne grandan
profiton vere
ricevi el plantado!
Iru al palac’ prefere
kaj eĉ libere.

Vi rajtas
preni, kiom vi

volas. Ĉe rikoltado
la oron dividos ni.
Okdek pocent mi

ricevos
kaj vi ja dudek!”
Afanti respondis do,
“Ha, vere bona ide’!
Ni tuj agu ek!”



Afanti
en la posta tag’
prenis du ĝinojn ** da or’
el la palaca monlag’
por rikolta pag’.

Redonis
per la reĝa or’
li la pruntitan monon.
Temp’ rapide pasis for
ĝis rikolta hor’.

Denove
li prunteprenis
jen dek ĝinojn da oro,
al la reĝo alvenis,
ĝin antaŭtenis.

Kun ĝojo
la reĝ’ ridete
vidis la brilan oron,
decideme kubjete

volis pli prete.

Subuloj
sub lia ordon'
jen donis al Afanti
kestojn da or' el reĝ-dom'
por urĝa bezon'.

Afanti
post hejmenreven'
redonis la pruntitan,
disdonis oron kun ben'
al povruloj jen.

Post semajn'
li kun trist-mien'
iris viziti reĝon
malĝoja kun man-malplen',
dronante en splen'.

La reĝo
ĉuis avide,
"Kial ne venis ĉaroj
kun oro ja laŭvide?
Diru rapide!"

"Ve al mi!"
Afanti plore
diris, "Ĉu vi ne vidis,
ke ne pluvis favore
eĉ unuhore.

La oro
semita tute
mortis ja pro sekeco.
Ni perdos absolute
ĉion ĝisnude!"

Eksplodis
la reĝ' pro koler'
kaj kriis, "Sensencaĵo!
Min vi trompis per malver'
jen pro malsincer'.

Diru nun,
kiel povus or'
formorti pro sekeco?
Ĝi ne similas al flor'
sen pluva likvor'."

Afanti
diris trankvile,
"Vi ne kredas tion, ĉu?
Do, kial vi facile
kredas delire

kreskadon
de or' post semad'?"
La reĝo tuj mutiĝis
desaponta sen parad'
kun vanga skarlat'.



**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma
poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimarangō
xa,xa,a (x=senrima).*

*** ĉina mezurunuo de pezo egala al duona kilogramo*

Yanke (Ĉinujo)

Funebre pri mia frato

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*

Ve!
Frato mia juna tre
jen paŝis
ĝis sia pere'.

Plu
ne jam aŭdiĝas voĉbru'
kaj ridoj

viaj sen enu’.

Jam
malaperis kiel flam’
la mien’
de mildo kaj am’.

Ni
du vivis en famili’
intime
kaj en harmoni’.

En
antaŭkabana ĝarden’
ni kune
laboris kun pen’.

Al
montopinto ni de val’
grimpadis
per voja spiral’.

Per
boat’ ni du laŭ river’
vojaĝis
foren en vesper’.

Por
trovi keston de trezor’
ni ŝvite
fosis ĝis aŭror’.

For
tiuj bildoj el memor’
vanuis
ja kiel vapor’.

Nur
rakontas venta susur’
pri viaj
malĝoj’ kaj plezur’.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksfirma poemo el kvar versoj
de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Aleksandr Kovtun

Maljuna kverko

Brilanta suno kriis pri tio, ke venis ferioj.
Knabo Sergio estis plene feliĉa ĝis tiklo en
ventro. Gepatroj foriris al laboro, panjaj taskoj
laŭ mastrumo estis simplaj kaj facilaj, li faris
ilin dum unu horo. Fino! Nun dum plena tago
li estis libera.

Pasis dua semajno de ferioj. Ĝenerale
Sergio lernis bone, sed ne ŝatis lernejon. Tiel
okazis. Ial li malŝatis lerneajn sonorojn,
ĝeneralajn kunvenojn, pionirajn kongresojn,
konferencojn de pioniraj trupoj, marŝadon kun
kantoj kaj multajn aliajn “aranĝaĵojn”. Tuta lia
natura protestis kontraŭ “devigaj aferoj”. Tial
tiel ĝojigis lin somera libero kaj ebleco esti
sola kaj okupi sin pri interesaj aferoj. Jam
hieraŭ Sergio estis en biblioteko kaj prenis
plenan sakon de interesaj libroj. Legado estis
eĉ ne hobia sed vivmaniero. Patro aŭskultante
rakontojn de Sergio pri tralegitaj libroj
rikaneme ridetis kaj parolis: “Estus pli bone,
se vi tiel memorfiksus lerneajn taskojn kiel
tiujn librojn!” Sed kontraŭ pasio de filo pri
libroj li ne kontraŭdiris, li mem ŝatis legi.

Sed hodiaŭ Sergio ne volis legi. Suno ridis
kaj palpebrumis al Sergio tra foliaro de
pomarboj. Kaj decido venis mem. “Mi veturos
al arbaro!” Sergio havis ankoraŭ unu pasion –
biciklon. Li havis malnovan biciklon
“Ukrainio”, kiun li ricevis post pli aĝa frato,
kiu forveturis lerni al urbo. Sergio dum tuta
printempo riparigis biciklon. Li malmuntis ĝin,
purigis, reguligis, ŝanĝis ion, mallongdirante li
ordigis ĝin. Nun biciklo funkciis senriproĉe.
Movo estis flua, bremsoj senpanee funkciis,
nenie kaj nenio grincis. Pro lia biciklo enviis
strataj amikoj kaj ankaŭ malamikoj. Urbo, en

kiu li loĝis, estis malgranda, ĉiuj scias unu la alian. Lin atingis famoj, ke oni volas ŝteli lian biciklon, ĉar ĝi estas bonega. Je-e-es! Tio estis gloro. Sed li ne volis perdi biciklon, kaj nun Sergio ne lasis ĝin sen gardo, ŝlosis ĝin per ĉeno al iu fosto.

Elirinte el sia korto Sergio kutime kaj kun strata ŝiko saltis sur biciklo kaj veturis laŭ malplena strato apud bordo de malnova lago. Tiu lago estis artefarita, oni konstruis ĝin tre delonge, en 19-a jarcento, en tiu tempo, kiam en ilia urbo oni konstruis sukeran uzinon. Lago estis grandega! Dividita je du partoj per digo lago per sia surfaco apogis sin al antikva arbaro. Sergio veturis laŭ bordo, kaj varma somera vento karese ludis kun liaj molaj blondaj haroj ĉiel almezurante al li diversajn hararanĝojn. Sed tio estis vane! Tutegale sur verto elstaris obstina tufo, kaj super frunto kiel ondo leviĝis alia tufo. Kvankam Sergio longe provis ordigi siajn harojn, sed ĉio estis vane. Kaj vento ne povis konkeri Sergiojn harojn kaj tufojn.

Dum tiu tempo Sergio turniĝis al digo. Veturante laŭ ĝi li subite ekvidis sian maljunan instruistinon de historio, kiu sidis sur bordo kun fiŝkano en manoj kaj kun cigaredo en dentoj kaj enpenŝiĝeme rigardis flosileton. Tio tre amuzis lin, kaj li decidis ne perdi eblecon interkomunikiĝi kun instruistino. Ĝenerale ŝi estis pensiulino kaj ne laboris, sed ŝi plaĉis al Sergio.

– Saluton, Marija Ignatjevna! – Sergio laŭte salutis.

La maljunulino ektemis pro subiteco.

– Mia Dio! Kial vi krias? Ja vi tiel timigos al mi ĉiujn fiŝojn! Nu saluton.

– Sed ĉi tie fiŝoj estas malmulte. Vi devas transiri al insuletoj, – Sergio konsilis.

Instruistino ridetis.

– Vi nemulte komprenas en fiŝkaptado... Sergio diru al mi, por kio niaj antaŭuloj kaptis fiŝojn?

– Tio estas kompreneble. Por manĝi ilin.

– Nu tio estas ĝuste. Sed nun por kio homoj iras al fiŝkaptado? Sed manĝo sufiĉas.

Sergio enpenŝiĝis.

– Ĉu verŝajne por variigi sian manĝon?

– Ho, “bona lernanto”, – Marija Ignatjevna ridetis. – Nun homoj iras al fiŝkaptado por esti sola. Sed ĉi tie vi alveturis kaj ankoraŭ krias, timigas maljunan homon. Nu bone, ja vi ne scias, kion signifas trankvileco... Kien vi veturas?

– Al arbaro.

– Nu veturu. Transdonu saluton al patrino!

– Bone! – Sergio kriis jam demalproksime.

“Ŝi estas stranga”, – li pensis pri instruistino-pensiulino. Sed poste li pensis, ke ŝi estas rida, kaj tio estas bone.

Enveturinte an arbaron Sergio haltis kaj plu iris piede. Tiel estis pli oportune pririgardi ĉion ĉirkaŭe. Ĉi tie li sciis ĉiuj voĵetojn, rekonis arbojn kiel antaŭajn amikojn, memoris pri tio, kiaj fungoj sub kiaj arboj kreskas. Sed hodiaŭ li ne volis kolekti fungojn. Io tiris lin al lago. Ĉu verŝajne tiu renkontiĝo kun instruistino tiel efikis? Li jam povis senti lagon demalproksime, kvankam li ankoraŭ ne povis vidi ĝin pro arboj kaj arboj. Tra bruo de foliaro aŭdiĝis susuro de scirpo, iufoje histerie ekkriis ia birdo. Arbaro iĝis pli maldensa, arboj disŝoviĝis donante vojon al suno. Apud lago estis arbarkampo, en kiu kreskis mola herbo. En mezo de tiu arbarkampo staris multjarcenta kverko. Sergio nevole haltis admirante tiun giganton. Dikega trunko forte apogis sin al tero, kaj al ĉielo etendis grandegaj brako-branĉoj. Kiom vi vidis dum via vivo, maljunulo! Sergio mallaŭte kun ia nekomprenebla timo en brusto aliris al arbo. Ial li ĝenis sin apogi biciklon al trunko de kverko, kaj li kuŝiĝis biciklon sur herbo. Ŝajnis, ke kverko rigardis Sergiojn mallaŭte movante siajn foliojn. Pro tio knabo pli multe ĝenis sin. Kaj subite mem ne komprenante por kio li tion faras, Sergio faris paŝon al kverko kaj ĉirkaŭprenis malglatan

trunkon per siaj brakoj alpremiĝante al ĝi per tuta korpo. Kverko verŝajne ne atendis tian senĝenon kaj ekbruis per folioj. Sed Sergio pli forte alpremiĝis al ĝia trunko sentante ian timon. Bruo de foliaro malaperis, kaj knabo subite komprenis, ke kverko akceptis lin kaj ne koleris pro li. De malglata ŝelo komencis flui varmo, pro tio Sergio trankviliĝis kaj pli kuraĝe komencis pririgardi sian novan amikon. Li malrapide ĉirkaŭiris arbon karesante ĝian trunkon, admirante ĝian belecon. Poste li sidis apude kaj apogis sin al ĝi per dorso.

Sergio sidis kaj kun miro komprenis, ke tutan lian korpon trapikas forto kaj energio de maljuna kverko. Komforta kaj mola varmo tute volvekovris lin. Muskoloj malstreĉis sin, kaj ŝajnis, ke nenia forto povas devigi Sergion ekstari kaj foriri de tiu loko. Sidante apud kverko Sergio subite klare sentis sin tia malgranda kaj sendefenda sur tiu tero. Ĉiuj sentoj iĝis pli akraj. Ĉirkaŭantaj lin sonoj – bruo vento en foliaro, plaŭdo de ondoj sur lago, ekkrioj de birdoj, susuro de iaj nevideblaj bestetoj en herbo – ĉio subite kuniĝis en iu stranga muziko. Sergio volis aŭskulti tiun muzikon ankoraŭ kaj ankoraŭ. Knabo forgesis ĉion en mondo. Li subite sentis sin kiel parteto de tiu grandega mondo kaj komprenis, ke li vivas ne simple tiel, ke en tio estas senco kaj ke li estas parto de Universo. Tiu sento estis nova kaj stranga, sed kun ĝi estis bone kaj trankvile.

Kiom li tiel sidis, Sergio ne sciis. Sed malstreĉiĝo ŝanĝiĝis je sento de ia nekonata interna forto kaj certeco. Knabo ekstaris, ankoraŭfoje ĉirkaŭprenis sian amikon kaj penante ne brui komencis reveni reen. Atinginte vojeton li ree brave saltis sur biciklon kaj veturis al hejmo. Feliĉo superplenigis lin pro tio, ke nun li faris grandan eltrovaĵon. Hodiaŭ li komprenis, ke li estas parto de tiu mondo kaj ke li estas samtiel grava en mondo kiel kverko, kiel ĉielo, kiel lago...

Alveturinte al digo li ekvidis instruistinon Marija Ignatjevna, kiu malrapide iris renkonten. Sergio haltis. Liaj okuloj tiel brilis, ke maljuna instruistino nevole ridis rigardante lian admiran vizaĝon.

– Nu rakontu, kio okazis, – ŝi diris ridetante.

– Marija Ignatjevna, mi trovis tian interesan kverkon!

– Kia kverko? Kiu staras sur arbarkampo apud lago? – instruistino ruze fermetis okulojn.

– Ĉu vi scias? – Sergio konsterniĝis.

– Ja mi vivas longe kaj tial scias ĉion, – ŝi diris kaj neforte klakis knabon je nazo. – Nu kion interesan vi eksciis?

Sergio respondis ne tuj. Li nemulte silentis, atente rigardis okulojn de sia maljuna instruistino kaj diris:

– Marija Ignatjevna, mi nun scias, kio estas trankvileco. Mi komprenis tion tie, apud kverko.

Instruistino mire rigardis lin, poste neatendite por Sergio subite tenere karesis lin laŭ kapo kaj mallaŭte diris:

– Konservu tion en koro, knabo. Nepre konservu, tion komprenas ne multaj homoj...



Ilustraĵo de Tatjana Ĥomjakova

Post multaj jaroj, kiam li iĝis plenaĝa kaj okupita homo, Sergio alveturis al sia malnova urbo. Tie li ne havis konatojn. Gepatroj jam mortis, li mem forveturis el tie post abiturientiĝo de lernejo kaj neniam revenis. Sed en tiu jaro nekredbla sopiro je gepatraj lokoj ial posedis lin. Ĉefurba tumulto tiel tedis lin, ke plu li jam ne povis elteni. Trovinte kelkajn liberajn tagojn Sergio alveturis ĉi tien en malfrua vespero. Turniĝante en lito en nekomforta ĉambro de ĉi-loka gastejo li kun peno atendis matenon. Matene post vekiĝo li tuj elkuris al strato. Gamboj mem portis lin al konata arbaro. Dum vojo li maltrankviliĝis, ĉu tiu kverko vivas? Li venis al tiu arbarkampo kaj ekvidis sian maljunan amikon. Kverko preskaŭ ne ŝanĝiĝis dum dekoj da jaroj. Ĝi same ekbruis al Sergio per sia foliaro, kvazaŭ indignas, ke li maltrankviligis ĝin. Kun haltinta koro Sergio aliris al ĝi.

– Nu saluton, amiko, – li mallaŭte diris. – Ĉu vi rekonas min?

Sergio staris apud arbo kaj tenere karesis trunkon per mano. Kaj poste li kiel malgranda knabo ĉirkaŭprenis kverkon kaj alpremiĝis al ĝi per tutaj fortoj.

– Bonvolu rekonu min.

Maljuna kverko kaptis impeton de vento kaj ekbruis per foliaro tiel, kvazaŭ ekspiris per tuta brusto. Ĝi nemulte balancis junajn branĉojn kaj rigidiĝis. Tuj Sergio denove sentis tiun saman varmon, kiu trapikis lian korpon.

– Vi rekonis min, maljunulo, – li flustris, kaj lia gorĝo subite rasp doloris. – Vi rekonis...

Sergio sidis apud arbo apoginte sin al ĝi per dorso kaj longe flustre kaj senvoĉe rakontis pri tiu malproksima tago, pri si, pri tio, kion li komprenis tiam, en infanaĝo, sidante apud maljuna kverko.

– Amiko, ja tiam mi unue sentis tion, kion komprenis tiam ne ĝis fino, – Sergio diris ekstarinte kaj turniĝinte al kverko. – Mi tiam unue sentis, kiel tio estas bonege havi en

animo konkordon kaj harmonion. Tio ne ofte estis en mia vivo... Mi dankas vin.

Forirante li ankoraŭfoje rerigardis. Maljuna kverko staris kaj apogis ĉielon per siaj branĉoj. Sergio subite pensis, ke kverko staris tiel jam dum centoj da jaroj. Ĉirkaŭe kuris vivo kun siaj pasioj kaj teruroj, sed ĝi restis tia sendependa, sola kaj silentema. Sed kiom saĝeco estas en tiu silento!

Sergio staris kaj ne povis deŝiri rigardon de arbo. Konjektoj kaj nekklaraj bildoj rondiris en kapo kiel rapida rondodanco. Al li ŝajnis, ke kverko volas klarigi ion al li.

– Mi komprenis vin, – Sergio subite diris.

Liaj pensoj iĝis klaraj kaj precizaj, kvazaŭ iu dislokis ilin al siaj lokoj.

– Ĉio estas klare. Vi estas sola, maljunulo. Sed vi mem ekvolis tion. Saĝeco kaj honesteco estas ermitoj, sed tio ĉiam estas volonta elekto. Vi restis sindona al si, sed pago pro tio estas soleco... Ĉu mi estas ne prava?

Sed kverko ne atentis liajn vortojn. Li havis pli gravajn aferojn. Per maljunaj fortegaj brako-branĉoj ĝi devis teni tiun ĉielon samtiel kiel antaŭ centoj da jaroj...

Esperantigis



Igorj Ĥomjakov

(Rusio)



Eldonas Redakcio de *Penseo*

Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Veĵdo)

Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio

Tel: (023) 67095890 (hejme)

Retadreso: vejdo@163.com

Ĉiujn kontribuojn al la ĉefredaktoro.

Por legi pasintajn numerojn de *Penseo*, vin
turnu al www.elferno.cn/penlisto.htm

